

V-19479 1000

# BULGARA ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

NOVJARAJ  
MEDITOJ

KONKURSO DE  
VAPCAROV-  
POEZIO

BATALANTA  
HEROLDO

KUN E-PAROLO  
KAJ KANTOJ  
TRA SOVETIO


ZAMENHOFAJ  
TAGOJ

JUNA  
ESPERANTISTO

IMPRESOJ EL  
JAPANIO

HEROA  
PASINTECO

ENLANDA MOVADO



JARO 53 • 0-RO 12 • DECEMBRO • 84



ŠIŠMAN BOČEV

## Novjaraj bondeziroj

Bonan jaron, novan jaron,  
mi deziras al vi sanon,  
longan vivon kaj feliĉon!  
Ruĝan pomon en ĝardeno,  
oran spikon en kamparo,  
vinberegion sur la vito,  
klaran vinon en barelo,  
grandan panon sur la tablo,  
dolĉan kukon por feliĉo,  
ringopanon sur bastono,  
ormoneron sur la kolo,

plenan domon de infanoj,  
plenan korton de ŝafidoj,  
de ŝafidoj kaj kapridoj,  
plenan kampon de ĉevaloj,  
de ĉevaloj, ĉevalidoj,  
plenan stalon de bovinoj,  
de bovinoj kaj bovidoj,  
ruĝtraktoron en grenkampo,  
ruĝtraktoron kaj kombajnjon,  
pezmonujon sur la kolo,  
sur la kolo kaj en poŝo.

Kiom da steloj en la ĉielo,  
tiom da sano en ĉiu domo  
dum la jaro, dum la jaro,  
dum la jaro kaj por ĉiam!  
Bonan jaron, novan jaron,  
mi deziras al vi sanon,  
longan vivon kaj feliĉon!  
Verdan stelon sur la brusto,  
espervorton je la buŝo,  
je la buŝo kaj en koro,  
de la koro en animon;  
plenan domon de junuloj,  
de junuloj kaj lernantoj,  
la junuloj kaj lernantoj  
estas niaj daŭrigantoj —  
de nia sankta afero Esperanta;  
plenan domon de kursanoj  
en Pisanica-palacdomo,  
kursanoj kaj instruistoj,  
instruistoj junaj, spertaj,  
junaj, spertaj kaj kapablaj,  
necesegaj por gvidado  
de la kursoj en lernejoj,  
en lernejoj kaj kluboj.

Longan vivon mi deziras,  
longan vivon kaj feliĉon:  
al gvidantoj kaj estraroj,  
al agantoj en la sfero  
de la arto kaj kulturo,  
al agantoj en tutmondo  
por la paco, amikeco.

Kiom da gutoj en Nigra Maro,  
tiom da sano al verdanaro  
dum la jaro, dum la jaro,  
dum la jaro kaj por ĉiam!





## NIN ATENDAS NOVAJ TASKOJ

La mondo renkontas la Novan jaron 1985 maltrankviligita.

La militemuloj el la imperiisma administracio de Usono kaj ties kunhelpantoj en la ceteraj kapitalismaj landoj elspezas neimageble grandajn financajn rimedojn por febra armigo, preparas sin por nova eksterma nuklea mondmilito.

Tiuj militpreparoj, tutkompreneble, devigas ankaŭ la landojn el la socialisma komuneco fari la necesajn paŝojn por konservi la ekzistantan militekvilibron, por konservi la mondan pacon.

En multaj kapitalismaj landoj ĉiam pli kreskas la kontraŭmilita agado de la pacamaj polamasoj: ĉiam pli oftaj estas la protestaj manifestacioj de homoj kun tute malsamaj politikaj kaj religiaj konvinkoj, sed unuigitaj de la komuna volo vivi kaj labori en paco, savi la homan civilizacion. Al tiuj pacamaj manifestacioj aligas sian fortan voĉon ankaŭ la Mondpaca Esperantista Movado (MEM), en kies vicoj aktive agas la bulgaraj geesperantistoj.

Malgraŭ ĉiuj minacoj, malgraŭ la tre serioza, danĝera monda situacio, ni la bulgaraj esperantistoj estas optimistoj kaj firme kredas, ke la pacamaj fortoj venkos ĉiujn danĝerojn! Nin atendas riĉa je E-arangoj jaro.

Ĉiuj societaj kaj distriktaj estraroj de BEA komencu seriozan propagandan laboron pri Esperanto lige kun la antaŭstaranta 41-a kongreso de la Bulgara Esperantista Asocio, kiu okazos en julio 1985 en Sofio. Kiel delegitoj al la kongreso de BEA devas esti senditaj la plej meritaj kaj aktivaj esperantistoj!

La popularigo de la E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj (civitanoj kaj gelernantoj), la kreo de E-klubo en la mezlernejoj estas nedisigebla de la preparlaboro por solena celebrego de la 100-jariĝo de Esperanto en 1987. La Cen-

tra Estraro de BEA jam aprobis, presigis kaj dissendis al ĉiuj societaj kaj distriktaj E-estraroj ideojn por diversaj lokaj arangoj.

Nia granda devo estas ankaŭ la preparado de spertaj E-instruistoj por la bezonoj de la ĉiam pli kreskanta E-movado en nia lando.

Por ĉiuj dezirantoj partopreni la Nacian Revuon de Esperanto-Parolo kaj Kanto (fine de aprilo 1985 en urbo Ĥaskovo) kaj la Internacian Recitalon-Konkurson de Boteva Poezio en Vraca jam estas tempo por obstina sinpreparo: ili devas elekti plej taŭgajn konkursaĵojn, bone ellerni ilin kaj arte prepari ilian prezentadon sub la gvidado de spertuloj.

Ni ne forgesu ankaŭ aliajn gravajn internaciajn E-arangojn, kiuj okazos en Bulgario dum la venonta 1985 jaro:

— Tria Sesio de la Internacia Somera Esperanto-Universitato en Veliko Târnovo;

— Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Kooperativanoj;

— Internacia Infan-sembleo „Standardo de la paco“, kiun post tre serioza sinpreparo partoprenos ankaŭ bulgaraj infanoj-esperantistoj;

— Unua Internacia Festivalo de Esperantistaj Foto-Kino-Amatoroj en IEK-Pisanica sub la aŭspicio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF).

Bulgaraj geesperantistoj partoprenos en 1985 ankaŭ vicon da internaciaj E-arangoj en aliaj landoj — la 70-an UK de Esperanto en Augsburg, FRG, la 37-an IFEF-kongreson en Vejle, Danlando, ktp. Ili devas esti modelo de digna sinteno kaj de aktiva partopreno. Ili estu arda propagandantoj de l'atingoj de la bulgara popolo en la socialisma konstruado kaj en la defendo de la mondpaco.

La Nova jaro 1985 estu por ni ĉiuj paca, sana, fruktodona!

## Ĉu numero de la leganto?

La redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncis n-ro 12/1984 kiel „numeron de la leganto“. Certe tio ne estas ideo tute nova, sed ĉi-foje ni tre entuziasme lanĉis ĝin. Malgraŭ la disponigita sufiĉe longa tempo por verkado kaj sendado de materialoj flanke de la legantoj, por „ilia numero“ ĝis la difinita templimo al la redakcio estis senditaj nur ĉirkaŭ 20 kontribuajoj. Kaj tute ne kuraĝigaj!

Kial do?

Ne nur pro la malgranda nombro de la kontribuajoj, sed ankaŭ pro ilia nekontentiga valoro el belarta vidpunkto, kaj en iuj okazoj — pro ilia primitiveco.

Tamen ni ne estu tro severaj, ĉar, kompreneble, tio estas unua provo de la redakcio disponigi la paĝojn de la revuo al siaj legantoj kaj prepari kajeron laŭ iliaj ideoj, instigoj kaj proponoj.

Fakte, la pliparto de la ricevita kontribuajoj estas nur proponoj kaj instigoj! Jen, ekzemple:

Zahari Ivanov el Sofio rekomendas al la redakcio publikigi pli ofte materialojn pri lingvaj problemoj, pri la instrulaboro, kaj konkrete — intervjuon kun la prezidantino de Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK) pri ties mastrumagado. Tonja Cakova kaj Maria Paĉeĝieva, ankaŭ el Sofio, proponas publikigon de interesaj eltiraĵoj el leteroj de legantoj kaj de paralelaj tekstoj en bulgara lingvo kaj en Esperanto, organizadon de E-kursoj per la radio kaj televido. Pli da materialoj represi-

taj el fremdlandaj E-revuoj, kaj materialoj pri la esenco de Esperanto proponas Nikola kaj Valeri Nikolov el Sofio. Ilia samurbanino Nevena Petrova esprimas interesigon pri E-insignoj kaj interesaj belartaj E-suveniroj. Aliaj proponoj rilatas tradukojn de legindaj materialoj el bulgarlingvaj eldonaĵoj en Esperanton, kiel, ekzemple, la artikolon „La homo, kiu parolas 200 lingvojn“, k. a.

Sed tiuj proponoj ja estas nur instigoj, kiuj estas traktataj pli-malpli ofte sur la paĝoj de la revuo.

Bedaŭrinde, malmultaj estas la valoraj, publikigindaj kontribuajoj. Ni plezure donas lokon al la versaĵoj de Ljuba Bojaĝieva kaj Siŝman Boĉev el Sofio, de Rada Lazarova el Burgas kaj Atanas Krumov el Plovdiv, kiujn vi legos en tiu ĉi kajero.

Ĉu ni povas aserti, ke n-ro 12/1984 de „Bulgara Esperantisto“ estas „numero de la leganto“? Certe jes! — malgraŭ ke ĝia enhavo konsistas ne nur el materialoj senditaj de la legantoj.

Ni kore dankas al ĉiuj, kiuj eĥis al nia ideo kaj afable sendis al ni siajn verkojn. Ni esperas, ke estonte la legantoj estos multe pli aktivaj niaj kunlaborantoj. Kaj eble iu el la venontjaraj numeroj de „Bulgara Esperantisto“ efektive plene meritos esti nomita „kajero de la leganto“.

Karaj legantoj, ĉu vi samopinias?

LA REDAKCIO

RADA LAZAROVA

### DEZIRO

Kiam la amo foriras de ni,  
estu neniam ni tristaj,  
ĉar la memoroj ja restos ĉe ni —  
vivaj, senvivaj — ne lastaj!

Sed mi ja havas peton al viaj  
strato, ĉambreto, kiso, kares'  
neripeteblaj ili restu! Nur niaj!  
Estu nur mia tiu adres'!

Pasas la jaroj . . . Griziĝas harar' . . .  
Homo revidos la homon.  
Bone, se povus ni en amikar'  
nun rememori la bonon.

Kaj ni rakontu pri l'tago kaj nokt',  
pri la suferoj kaj venkoj,  
pri nia vivo veninta sen dot' . . .  
Do, vi komencu! . . . Ne ĝenu! . . .

LJUBA BOJAĜIEVA

### PARALELOJ

Mi scias, ke estas en mond' nia vasta  
muzik- eminentuloj,  
ke ties talentaj verkoj abundaj  
luladas l'animon pasie . . .  
ĉiam min skuas la forto senmorta  
de la sonatoj,  
de l'simfonioj. . .  
Mi sentas la riĉon de l'sonoj belegaj  
el sub la manoj de famaj artistoj.  
Mi konas la ritmojn batantajn senĉese  
en dancoj diversaj tutmonde konataj,  
kiuj la koron gajigas sen vorto  
kaj igas ĝin bati pli ritme pro ĝojo. . .

Sed se mi subite de ie ekaŭdus  
la sonojn de iu malnova kant' nia,  
sub miaj piedoj la ter' tuj ekluligas  
pro am', pro sopiro,  
pro emociigo.

Tiuj modestaj kantoj tre simplaj  
enhavas en si mem vervajn rakontojn  
pri travivaĵoj de nia popolo  
kaj tra jarcentoj al ni transportitaj  
por ne forgesi la pasintecon!

En senpretendaj sonoj mi kaptas  
de la povruloj la vean ploradon —  
iama sklavaro de sangsoifuloj.  
En ili perceptas mi la ŝviton gutantan  
ĉiam verŝitan malŝpare kaj mute  
de l'malriĉuloj — martiroj iamaj —  
sur nigraj novaloj plorantaj . . .  
Senĉese mi aŭdas la voĉojn heroajn  
de la hajdutoj — viktimoj sennomaj —  
portantaj sur siaj standardoj flirtantaj  
devizon senmortan:

„Libero aŭ morto“!  
Mi aŭdas rigorajn blasfemojn kolerajn  
de l'partizanoj ŝtele vagantaj  
sur la montaroj neĝe kovritaj,  
persekutataj de kruda malamo . . .

Iu kvin-tona kant' ordinara  
min memorigas pri l'dolĉaj vizioj  
de la infano imag' fantazia,  
kiam panjo mia per ĝi min dormigis . . .

Tiuj ĉi kantoj modest-senpretendaj  
enhavas la vivon, tuthistorion  
de popol' nia — aglaro fluganta —  
ĉiam nomata per nomo sanktama  
— PATRUJO!

## KUN LA INSPIRITA PAROLO DE VAPCAROV



La poeto-komunisto Nikola Jonkov Vapcarov

En 1982, laŭ iniciato de la Distrikta Estraro de BEA en Blagoevgrad kaj de la Kulturcentro „M. Gorkij“ ĉe UE de BEA—Sofio, en Bansko — la naskiĝurbo de la poeto-komunisto Nikola Vapcarov, unuan fojon estis organizita Nacia Recitalo-Konkurso de Vapcarov-verkoj enkadre de la literaturaj festoj lige kun la

naskiĝdato de la poeto — la 22-a de novembro.


La bona organizado kaj la entuziasma partopreno de multaj esperantistoj el ĉiuj generacioj estis preteksto, ke oni ekparolu pri la aprobo de tiu iniciato kiel konstanta konkurso-recitalo de Vapcarov-poezio, kiu okazu ĉiun duan jaron. Estis lanĉita ankaŭ la ideo pri transformo de la recitalo en internacian E-konkurson kun partopreno de fremdlandanoj.

La jaro 1984 estas notinda ne nur por la naskiĝloko de Vapcarov, ne nur por la bulgara poezio, sed ankaŭ por ni, la bulgaraj esperantistoj, ĉar la esperanta parolo denove sonis en Bansko dum la festoj lige kun la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario kaj kun la 75-a datreveno de la naskiĝo de Nikola Vapcarov. Per sia tragika morto li pruvis, ke la vivo de la poeto estas nedisigebla de lia verkaro. En nia konscio Vapcarov por ĉiam restos 33-jaraĝa, „poeto en la florado de siaj fortoj, eterne juna poeto!“

Simbola estas la fakto, ke la verkoj de la unua bulgara poeto, ricevinta la Internacian Premion por Paco, jam sonas ankaŭ en la Internacia Lingvo — lingvo de l'amikeco kaj de la paco!

La Dua Nacia Recitalo-konkurso de Vapcarov-verkoj en Bansko okazis la 5-an—7-an de oktobro ĉi-jare. La dommastroj montris modelan organizadon, prizorginte la enloĝigon de la partoprenantoj en du turistaj dormejoj, kio faciligis la senperajn kontaktojn de esperantistoj el diversaj partoj de la lando kaj ilian amikiĝon.

Tre bona iniciato estis la aranĝita la 5-an



Daniela Denčeva el Sofio (1-a premio)

de oktobro vespere projekciado de la bulgara ludfilmo „Kanto pri la homo“, kiu rekreas la malfacilan vivovoĵon de Vapcarov kaj lian revolucion aktivecon.

La sekvantan tagon matene sur la granda placo antaŭ la bela konstruaĵo de la Domo de Kulturo regis vigleco — kunvenis multaj esperantistoj por partopreni en la Recitalo-konkurso. Oni metis florkronon antaŭ la monumento de Nikola Vapcarov kaj faris la tradician komunan foton. Salutparolis la unua sekretario de la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio, kiu esprimis sian kontentecon, pro la fakto, ke la esperantistoj estas unuaj en la programo de la literaturaj festoj de Vapcarov-verkaro, bondeziris al ili sukceson en la nobla konkurso, kaj esprimis esperon, ke estonte ĝi transformiĝos en internacian arangon.

Al la salutparolo respondis Dimităr Papazov, sekretario de BEA, kiu kredis la organizantojn de la Recitalo, ke la bulgaraj esperantistoj estos ĉiam unuj inter la plej vervaj partoprenantoj en la literaturaj Vapcarov-festoj.

La ĉi-jarajn festojn partoprenis kelkaj E-kolektivoj de junpioniroj, komsomolanoj kaj junularaj trupoj, samkiel multaj individuaj plenumantoj diversaĝaj. La plej malgranda plenumantino Iliana Petkova el Stara Zagora inaŭguris la Recitalon-konkurson per la tre populara Vapcarov-versaĵo „Kredo“, kiu eksonis kiel alvoko al ĉiuj esperantistoj-partoprenantoj en la ĉi-jara arango.

En daŭro de kelkaj horoj en la salono de la kulturdomo sonis la flamaj versaĵoj de la talenta poeto-kontraŭfaŝisto, kiu pereis en senkompata, kruela batalo, lasinte al la generacioj sian profundan kredon je la „tagoj estontaj“, sian esperon pri la venko de la homa spirito.

Bonege sin prezentis la junpioniraj grupoj el Pleven, el la Junulara Kulturmodo „Lilija Karastojanova“ (Kolarov-subdistrikto—Sofio) kun artgvidantino Jordanka Gerginova, la junpionira kolektivo el Goce Delčev kun artgvidantino Diana Guŝanova, la kantgrupoj el Targoviŝte (kun artgvidantino Maria Rajčeva) kaj el Blagoevgrad.

Per sia majstra plenumo nin ĉarmigis Daniela Denčeva (Sofio), Iliana Petkova (Stara Zagora), Irena Evgenieva (Pleven), Gjulten Kerimova (Targoviŝte), k. a. Dančo Dančev el Plovdiv kortuŝe deklamis sian originalan versaĵon „Antaŭ la monumento“ dediĉitan al N. Vapcarov. Niaj bone konataj plenumantinoj Antoaneta Panova (G. Orjaĥovica), Stamenka Dimitrova kaj Iliana Rangelova (Botevgrad) denove demonstris sian artan kapablon.

La prezidantino de la ĵurio Angelina Sotirova, lektorino pri arta parolo ĉe la Supera Teatra Instituto — Sofio, anoncis la premiitojn de la konkurso kaj kore dankis al la reprezentantoj de la lokaj soci-politikaj kaj kulturaj organizaĵoj pro ilia gastamo kaj bona organiza laboro. Si substrekis la gravecon de tiu



Iliana Petkova el Stara Zagora (II-a premio)

kultura esperantista tutlanda arango omaĝe al la verkaro de Vapcarov — poeto-revoluciulo kaj digna civitano, kiu glorigis Bulgarion per siaj inspiritaj versaĵoj.

Evidentiĝis, ke la poezio de Vapcarov estas tre proksima al la plenumantoj el ĉiuj aĝgrupoj, komprenata de ĉiuj. Pro tio oni ĝuis kelkajn altnivele plenumitajn verkojn, kiuj estis plenmerite aplaŭditaj de la publiko.

La reprezentantino de la Urba Konsilantaro pri Kulturo en Bansko enmanigis la premiojn al la distingitaj partoprenantoj.

Agrabla surprizo estis la improvizita kon-

certo, kiun prezentis la premiitoj en la konkurso kaj kelkaj artistoj-gastoj de la recitalo: Maria Angelova, Mihail Ĉobanov, Angelina Petrova kaj Ginka Toteva.

La ĉi-jara Recitalo-Konkurso de Vapcarov-verkoj ankoraŭfoje pruvis, ke la bulgaraj esperantistoj estas ardaĵ adorantoj de lia personeco kaj poezio, ke ili estas kapablaj digne sin prezenti antaŭ internacia publiko.

Bansko — Sofio, oktobro 1984

ANGELINA SOTIROVA,  
prezidantino de la ĵurio

## LISTO DE LA PREMIITOJ

En la dua Nacia Recitalo-konkurso  
de Vapcarov-poezio

### RECITADO

#### INDIVIDUAJ PREMIOJ

##### 1—8 klasoj

- I premio — Daniela Denčeva — Sofio  
II premio — Iljana Petkova — Stara Zagora  
— Irena Evgenieva — Pleven  
Kuraĝiga premio:  
— Teodora Arnaudova — Sofio  
— Ilonka Dimitrova — Pleven

##### 9—11 klasoj

- I premio — Albeno Filčeva — Sofio  
— Daniela Sirakova — Gorna Orjaĥovica,  
II premio — Gjulden Kerimova — Târgoviște  
III premio — Kanka Miladinova — Sofio  
Kuraĝiga premio:  
— Radostina Jankova — Jambol

#### Gejunuloj kaj plenkreskuloj

Premio por originala versaĵo „Antaŭ la monumento“,  
dediĉita al Nikola Vapcarov

- Dančo Dančev el Plovdiv  
I premio — Antoaneta Panova — Gorna Orjaĥovica  
II premio — Stamenka Dimitrova kaj Iljana Range-  
lova — Botevgrad  
III premio — Pavlina Makaveeva — Pleven  
— Dimităr Petkov — Gorna Orjaĥovica  
Kuraĝiga premio:  
— Boris Bodičev — Varna

### KOLEKTIVAJ PREMIOJ

#### 1—8 klasoj

- I premio — junpionira ensemblo — Pleven  
III premio — junpionira ensemblo ĉe la Junulara Kul-  
turdomo „Lilija Karastojanova“ — Kola-  
rov-subdistrikto — Sofio. Arta gvidan-  
tino — Jordanka Gerginova  
Kuraĝiga premio — junpionira ensemblo — Goce  
Delčev. Arta gvidantino — Diana Guš-  
tanova

### KANTADO

#### INDIVIDUAJ PREMIOJ

- II premio — Elena Koĵuĥarova — Varna

#### KOLEKTIVAJ PREMIOJ

- II premio — Junulara kantensemblo — Târgoviște. Art-  
gvidantino — Maria Rajčeva  
III premio — Kantensemblo de plenkreskuloj — Bla-  
goevgrad

#### ĴURIO:

Prezidantino — Angelina Sotirova  
Membroj: Maria Angelova  
Mihail Ĉobanov

Bansko,  
la 6-an de oktobro 1984

#### Karaj legantoj,

Se vi ne sukcesis aboni revuon „Bulgara Esperantisto“ pere de „REP“ (Ŝtata Entrepreno por Disvastigo de la Gazetaro), vi povas fari tion en la kancelario de BEA.

Distriktaj kaj societaĵ estraroj, aktivuloj, geamikoj, varbu ankoraŭ abonantojn al nia re-  
vuvo! Sumojn transpagu per poŝtmandato (kun indiko de la abonoj) laŭ konto 185/1052, DSK—4,  
Blagoevski rajon, SOFIO, kaj la adresojn sendu per letero al la Redakcio — bul. „Ťr. Bo-  
tev“ 97, BG-1303 SOFIO.

La jarabono estas la sama — 2.90 lv (5 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro).

La Redakcio



## BATALANTA HEROLDO



KOSTADIN ĈIĈANOV

Per la puĉo je la 19-a de majo 1934 la reakcia bulgara burĝaro neglektis la parlamentan formon de regado kaj enkondukis la monarko-faŝisman diktaturon. La tuta legala gazetaro de la laborista klaso estis malpermesita laŭ dekreto de la puĉistoj. La komunistarta partio estis devigata kaŝe eldoni siajn presorganojn.

Ankaŭ la Bulgara Laborista Esperanto-Asocio suferis pro la sama dekreto. BuLEA estis senigita je siaj eldonaĵoj „Balkana Laboristo“, „Mejrabkor“ k. a. Iuj el la gvidantoj de LEA estis malliberigitaj. La puĉo tamen ne paralizis nian laboron. La Centra Komitato de LEA direktis sian rigardon al urbo Plovdiv, kie funkciis forta kaj multnombra sekcio. En ĝi membris pli ol 100 esperantistoj — tabaklaboristoj, metalistoj, metiistaj helpantoj, komizoj ktp. La plimulto estis inteligentaj gejunuloj, organizitaj en RMS (Laborista Junulara Asocio) kaj aliaj progresemaj organizaĵoj.

Nelonge post la puĉo en Rodopi-montaro estis kunvokita konferenco de sudbulgaraj esperantistoj. Ĉeestis delegitoj el Plovdiv, Pazarĝik, Asenovgrad, Haskovo, Stara Zagora, Smoljan kaj el vilaĝoj Kuklen, Dâlboki, Konare, Bracigovo k. a. La centran komitaton reprezentis la verkisto Pelin Velkov.

La konferenco unuanime decidis la eldonadon de gazeto, kiu servu kiel interligilo por la esperantistoj el Suda Bulgario.

La zorgon pri la gazeto prenis sur sin plovdivanoj. Unualoke estas menciinda Kostadin Ĉiĉanov, ĉarpentisto. Li prenis sur sin la taskon ellabori la stencilaparaton. Ĉar li ne havis sperton en tiu ĉi rilato, li turnis sin al japana amiko-presisto, kiu sendis al li modelon de stencilaparto. Ĉiĉanov sukcesis konstrui la aparaton kaj oni aprobis la redakcion. Ĉefredaktoro estigis Hristo Marinov, kiu havis sperton en la redaktado, ĉar dum du jaroj eldonis tajpitan bultenon „Proleta Esperanto-korespondado“ (mallonge: PEK-servo). Redakcianoj estis la eldonisto Ĉiĉanov, la estraranoj de la sekcio Todor Sofroniev, Nikola Stefanov, Stojan Todorov. Kunlaboris: Todor Iŝev, David Sasonov, Georgi Kerelezov, Dimităr Andreev, Toma Ajolov k. a. Pri la disvastigado kaj ekspedado zorgis Maria Harizanova.

La unua numero de „Sturmulo“ aperis en la aŭtuno de 1934. En ĝi estis publikigitaj protesto kontraŭ la persekutado de esperantistoj kaj komunistoj, kontraŭ la furiozanta teroro, leteroj de sovetaj kamaradoj. Sur la paĝoj de „Sturmulo“ regule aperadis versaĵoj kaj prozaĵoj de junaj poetoj kaj verkistoj.

Kamaradino Maria Harizanova sukcese ekspedis la gazeton kiel en la landon, tiel ankaŭ en eksterlandon — al niaj amikoj en okcidentaj landoj kaj en Sovet-Unio.

„Sturmulo“ aperadis dufoje monate ĝis la sekvonta 1935 jaro, kiam la polico hazarde malkovris la presejon en la domo de la eldonisto. Sekvis aresto de la redaktoro kaj de iuj kunlaborantoj. En la policejo oni tradukis la aperintajn numerojn en bulgaran lingvon kaj la juĝesploristo povis fari la akton de akuzado. Post kelkaj monatoj la tribunalo konfirmis la verdikton: la eldonisto, la redaktoro kaj unu el la membroj de la redakcio estis kondamnitaj al kelkjara enprizonigo. La ceteraj arestitoj estis liberigitaj.

Dum la kondamnitaj restis en la prizono de Plovdiv, David Sasonov sin turnis al juristoj-esperantistoj en Okcidenta Eŭropo, kie oni organizis kampanjon kontraŭ la persekutado de bulgaraj esperantistoj-laboristoj. Komencis veni protestaj leteroj el eksterlando. Eĉ en la prizono venis komisiono el juristoj el diversaj landoj por vidi en kiaj kondiĉoj vivas la malliberigitaj.

La kondamnitaj esperantistoj — Hristo Marinov, Kostadin Ĉiĉanov kaj Todor Sofroniev trovis en la prizono vastan kampon por propagando de Esperanto inter la politikaj malliberuloj. Dekoj da junaj komunistoj kaj antifaŝistoj havis al si lernolibrojn en la prizono kaj studis la Internacian Lingvon.

Ĥ. ISKROV

## Kun Esp

Ankaŭ ĉi-jare, lige kun la

Niaj artistoj-esperantistoj  
sin prezentis per altnivela li-  
teratura-muzika programo kaj

al ni estis manifestita granda interesiĝo flanke de la esperantistoj, samkiel fare de la respublikaj amaskomunikiloj. La gazeto „Komsomolskaja Pravda“ intervjuis D. Ĥitrov kaj d-rinon Stamenova, starigante al ili demandojn pri la bulgara E-movado kaj pri niaj aferecaj kontaktoj en Vilnius.

Dum nia kvartaga restado en Vilnius ni ĝuis la varman gastamon de niaj litovaj kolegoj.

Pro nia partopreno en „MUZO-84“ ni devis rezigni nian viziton en Rigo kaj forflugis rekte al Tallinn — la ĉefurbo de Estona SSR. Dank' al la klopodoj de la prezidanto de la Estona Filio de ASE — docento Ferdinand Eissen, eksa multjara ministro de la popolklerigo de la Estona SSR, kaj de niaj malnovaj estonaj amikoj Jaan Ojalo kaj Johannes Palu, ankaŭ ĉi tie al ni estis proponita riĉa programo el koncertoj, renkontigoj, vizitoj ĉe malnovaj kaj novaj amikoj.

Nia delegitaro estis oficiale akceptita de la prezidanto de la Filio de SSOD en Estonio k-do Arnold Meri, heroo de Sovetunio, kaj de la gvidantaro de la Filio de ASE, kiuj esprimis sian sinceran kontentecon pro niaj iniciato kaj gastado.

Nia solena koncerto okazis en la plenplena de ĉeestantoj bela baroka salono de la Asocio pri Amikeco kun Eksterlando.

Niaj kantartistoj demonstris



La reprezenta grupo de BEA en Moskvo kune kun la sekretariino de ASE Lidija Ŝanina (la tria dekstre)

40-a jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario, de la 19-a de septembro ĝis la 4-a de oktobro reprezenta kvin-persona grupo de Bulgara Esperantista Asocio en konsisto: Dončo Hitrov, ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ — gvidanto, d-rino Cveta Stamenova, prezidantino de Sofia Urba Estraro de BEA, Jana Cikalova, operkantistino el la Nacia Opero en Ruse, Miĥail Zdravov, artisto kaj la juna kantisto Manol Tomov el la Nacia Opereta Teatro en Jambol, vizitis Sovetunion kaj donis riĉenhavajn belartajn-muzikajn koncertojn antaŭ sovetaĵ geesperantistoj en la urboj Vilnius, Tallin, Leningrado kaj Moskvo.

ĉie gajnis la aplaŭdojn de la publiko. Ili vere pruvis, ke Esperanto estas mirinde bone aplikata en la arto kaj kapblas esprimi plej subtilajn nuancojn de la homa penso.

Nia vizito en Vilnius koincidis kun unu el la plej grandaj belartaj arandoj de la sovietiaj esperantistoj — la XVI Tutsovetunia revuo de E-kantoj kaj parolo „MUZO-84“. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 250 esperantistoj el Litova SSR kaj el aliaj sovietiaj respublikoj. Antaŭ tia impona aŭditorio nia delegitaro estis prezentita fare de la prezidanto de la Litova Festivalo de ASE — docento Skupas.

La koncerto de niaj artistoj estis ŝtrome aplaŭdita kaj



Kantas Manol Tomov

sian altnivelan artisman majstrecon kaj plene meritis la entuziasmajn aplaŭdojn de la publiko. Tre agrablan impreson faris Jana Cikalova kaj Manol Tomov, plenuminte komponaĵojn de estona komponistino, kiu mem akompanis iliajn plenumojn.

Ni ricevis multajn invitojn pri gastado al esperantistoj, pri renkontiĝoj kaj trarigardo de la urbo. En intima esperantista etoso ni pasigis ege agrablan vesperon en la domo de nia nova konato Valdemar Kauts, kiun ĉeestis multaj geesperantistoj el Tallinn.

Docento Eisen sciigis al ni interesan fakton: pli ol 4000 estonaj soldatoj batalis por la liberigo de Bulgario elsub osmana jugo dum la Rusa-Turka Milito en 1877—1878 kaj multaj el ili lasis siajn ostojn sur bulgara tero.

Interesa momento el nia restado en Tallinn estis nia renkontiĝo kun grupo da studentoj el la Pedagogia Instituto, kiuj lernas bulgaran lingvon, instruatan fare de nia samlandano Ljubomir Zanev kaj lia edzino Mare Zaneva. En la kabineto de la dekano prof. Anatolij Baŭder ni longe interparolis bulgarlingve. La studentoj fiere montis al ni sian „anguleton de Bulgario“ kaj la bonege aranĝitan ekspozicion pri Bulgario el koloraj fotoj kaj afiŝoj. Ni vizitis ankaŭ la re-

dakcion de la instituta gazeto, kiu publikigis ampleksan informon pri nia restado kaj pri niaj koncertoj en Tallinn. Niaj junaj amikoj esprimis deziron lerni Esperanton kaj partopreni la kursojn en IEK-Pisanica.

Al nia gastado montris intereson ankaŭ la ĉefurba gazetaro. D. Hitrov estis invitita en la redakcion de gazeto „Kodumaa“, eldonata en pluraj fremdaj lingvoj, kie laboras kelkaj jurnalistoj-esperantistoj.

Nia restado en Tallinn estis unu el la plej sukcesaj kaj rezultodonaj. Ni forveturis tre kontentaj de la vizito ĉe niaj estonaj amikoj.


Malgraŭ la senĉesa pluvo kaj malvarma vetero, niaj leningradaj amikoj akceptis nin

korvarme kaj faris ĉion eblan por nia agrabla restado kaj pli bona organizado de niaj koncertoj. Kune kun ni dum la tuta tempo estis Viktor Gusev, vicprezidanto de la ASE-Filio kaj Natalia Nikiforova el la Leningrada Esperanto-teatro. La pliparto de la estraranoj de la Leningrada ASE-Filio kaj multaj lenin gradaj esperantistoj tiutempe estis en Krimeo, partoprenante E-aranĝojn. Tio estis la kaŭzo pro ne tre multnombra ĉeesto de esperantista publiko al niaj koncertoj, kiuj tamen brile pasis en la granda salono de la Domo de Amikeco sur strato Fontanka 21.

Viktor Gusev esprimis la deziron de la junaj esperantistoj el Leningrado pli vaste kunlabori kun bulgaraj gejunuloj-esperantistoj kaj partopreni la esperantistajn some-rajn labor-brigadojn en nia lando.

Emociplena estis nia vizito en la domo-muzeo de la granda operkantisto Feodor Ŝaljapin, kie konserviĝis multo de la hejma etoso kaj la artismo de la eminenta filo de la rusa popolo.

Sendube, nia restado en Moskvo estis plej rezultodona el vidpunkto afereca. Al ni montris viglan intereson la nova sekretariino de ASE Lidija Sanina, la prezidanto de la Centra Moskva E-klubo Dmitrij Perevalov kaj Ana-



Kantas Jana Cikalova

tolij Gončarov, respondeculo pri la junaj esperantistoj. Por bonvenigi nin estis venintaj malnovaj amikoj kaj ankaŭ tiaj, kiuj nur estis aŭskultintaj pri ni. Bedaŭrinde, pro malsaniĝo, la prezidanto de ASE — k-do Magomet Isajev, ne havis eblecon renkontiĝi kun ni, sed li ĉiam interesiĝis pri ni, pri nia programo kaj deziroj pere de L. Sannina.

Dum niaj interparoloj en ASE kun niaj moskvaj ami-

koj, ni starigis kaj kune traktis ĉiujn problemojn pri plua kunlaborado.

Ni konsideras tiujn interparolojn plej gravaj por nia reciproka estonta kunlaborado kaj kredas, ke la traktataj problemoj estos solvitaj kiel eble plej favore.

Nia koncerto pasis en intima amika atmosfero en iu el la malgrandaj salonoj de SSSR sur Kalinin-prospekto, n-ro 14. Ĉeestis eble la plej ardaĵ moskvaj geesperantistoj.

Post la koncerto kaj reciproka interŝanĝo de donacoj okazis amika interparolo. Ni restis kune ĝis malfrua vespero.

Tiu intima amika interparolo estis esprimo de la varma rilato kaj zorgemo, per kiuj ĉirkaŭis nin niaj amikoj-esperantistoj dum nia tuta veturado tra Sovetunio. Ja ni estis inter gefratoj!...

**DONČO ĤITROV, d-rino CVETA STAMENOVA, MIŠO ZDRAVEV, JANA CIKALOVA, MANOL TOMOV**

## GASTE AL E-KLUBO „ELBRUS“

S-ano Vladimir Ĵelev el Plovdiv veturis tra Sovetunio kaj gastis al siaj amikoj-esperantistoj en la sovetia urbo Kislovodsk. Ni donas lokon al liaj impresoj pri la urbo kaj pri la agado de la lokaj esperantistoj, kiuj aktivadas en la kadroj de E-klubo „Elbrus“

La sovetia urbo Kislovodsk situas en Norda Kaŭkazio. Ĝi estas granda centro de ripozo, kuracado kaj turismo kun ĉirkaŭ 100 000 loĝantoj, kiuj konas kaj amas nian landon. Tie oni povas vidi straton „Velingrad“, restoracion „Rodopi“, kafejon „Gornica“, sanatorion „Georgi Dimitrov“, kie iam ripozis kaj saniĝis la granda filo de nia popolo. En ĝi nun funkcias malgranda muzeo de Dimitrov.

En Kislovodsk vige aktivadas la E-klubo „Elbrus“. En ĝi membras pli ol 50 geesperantistoj — blindaj kaj vidantaj, inter kiuj estas instruistoj, inĝenieroj, muzikistoj, masagistoj. La klubanoj kolektiĝas en la Urba Domo de Komsomolo.

En 1962, kiam en la urbon venis por labori la nevidanta instruisto kaj elstara soveta esperantisto Anatolij Masenko, tie estis nur du vidantaj esperantistoj. Masenko organizis kursojn komence en la lernejo. Poste li instruis al civitanoj, preparis en Kislovodsk du spertajn kursgvidantojn — Anastasija Ĵukova — nevidanta kaj Vladimir Beljaev — vidanta instruisto. Estas interese menci, ke la nevidantaj instruistoj per la helpo de siaj kunlaborantoj instruas al vidpovaj kursanoj.

Por la propagando de Esperanto la klubo tre bone utiligas la lokajn radion kaj gazeton, kiuj regule organizas diversajn aranĝojn ne nur por esperantistoj. Jam estas tradiciaj du aranĝoj kun riĉa belarta E-programo, vizitataj de multaj loĝantoj de Kislovodsk. Unu — en decembro, estas dediĉita al L. L. Zamenhof, la alia en majo — al la festo de la venko super faŝismo. En ĝiaj programoj oni plenumas

bulgarajn kantojn kaj recitaĵojn. Dum la ĉi-jara decembra vespero la bulgara parto estis dediĉita al la 40-a datreveno de la socialisma revolucio en nia lando. Dum la nienciitaj aranĝoj oni organizis vendadon de E-literaturo.

Multaj esperantistoj el Kislovodsk havas amikojn en Bulgario. Iuj el ili vizitis nian landon en 1978 okaze de la kongresoj de UEA kaj LIBE kaj en 1980 okaze de nia jubilea 40-a kongreso.

La urbo estas ĝemeligita kun nia belega Velingrad, tamen laŭ la vortoj de niaj kislovodskaj samideanoj la rilatoj inter la esperantistoj el ambaŭ urboj povus esti pli viglaj.

Klubo „Elbrus“ intencas organizi dum la somero de 1985 E-tendaron. La dommastroj estos feliĉaj, se inter iliaj gastoj estos ankaŭ bulgaraj geamikoj.

Per sia varia agado E-klubo „Elbrus“ estas unu el la plej aktivaj en Sovetunio.

**VLADIMIR ĴELEV**

## „BUKUREŝTA INFORMILO“

Jam duan jaron en Rumanio aperas „Bukureŝta Informilo“ — trimonata folio en Esperanto. Ĉiu numero enhavas mallongajn artikolojn, novaĵojn el la E-movado en Rumanio kaj anoncojn.

En n-ro 1/1984 de „BI“ indas menci interese artikolon „75 jaroj de la Unua Kongreso de rumanaj esperantistoj“. En ĝi estas donita loko al rememoro de Atanas D. Atanasov (ADA), membro de la bulgara delegitaro, pri la okazinta en 1909 E-kongreso en Bukareŝto.

La folion „Bukureŝta Informilo“ eldonas „Centro por Informo kaj Dokumentado“, Bukareŝto. Adreso: Vochin Marian, P. O. Box 30—93, R-71 400 Bukuresti 30, Rumanio.



## Ni rompu la murojn inter la popoloj!...

La unua en la mondo kontraŭimperiisma revolucio en Rusio (1905—1907) vekis ĉe d-ro L. L. Zamenhof grandajn esperojn<sup>1</sup> pri alvenontaj pli favoraj sociaj cirkonstancoj kaj instigis lin ne nur malkaŝi sian simpatian al ĝi, sed ankaŭ imperative alvoki: „Rompu, rompu la murojn inter la popoloj. . . kaj nur tiam povos malaperi tiuj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj<sup>2</sup> (Genevo, 1906).

En Kembrigo, dum la III-a Universala Kongreso de Esperanto (1907) ŝajne ne sufiĉis la dufoje ripetita alvoko pri „rompado de la muroj inter la gentoj“<sup>3</sup>, tial li eĉ trian fojon vivuas pri „ĉio, kio rompas la murojn inter la gentoj“<sup>3</sup>. Ĝis nun oni povis nur supozi, kion Zamenhof kaŝas sub la figura esprimo „rompu la murojn inter la nacioj“. Tamen en la fino de sia vivo Zamenhof verkis artikolon, kiu donas al ni ŝlosilon por precize kompreni la enhavon de la „detruendaj muroj“, Tre verŝajne ĝi estas verkita en 1913—1916. Amiko de Zamenhof ĝin eligis el sia arkivo en la komenco de la Dua Mondmilito (septembre 1939) kaj ĝi aperis en decembro 1939.

Pro la furiozanta milito la poŝtaj komunikoj ne funkciis normale. Tial la „ŝlosila“ artikolo restis nekonata al la historiistoj de la Esperanto-movado kaj al la biografoj de Zamenhof. En la menciita artikolo Zamenhof eksplikas trankvile: „La veraj muroj inter la homoj estas nur (a) malsameco de la lingvoj: (b) la religiaj, (c) ekonomiaj kaj (ĉ) klasaj diferencoj“<sup>4</sup>. Havante tiun ŝlosilon ni jam povas traduki la esprimon „rompu la murojn. . .“ tute precize: „Solve la lingvan problemon en la inter-

nacia sfero, forigu la religiajn, ekonomiajn kaj klasajn diferencojn“ el la vivo de ĉiu nacio kaj la nova epoko de la homaro alvenos.

La trijara periodo (1905—1907) de skuado, krakado, bruado kaj rompado de la muroj inter la nacioj estas kronita per nevelkanta optimisma prognozo pri pereco de la maljusta, subprema, kontraŭpopola sociordo kaj per sagaca aludo pri kreo de la necesaj cirkonstancoj por alveno de tute nova epoko en la vivo de la homaro, kiam ne plu ekzistos naciaj, internaciaj, interŝtataj kaj interklasaj problemoj, kiam la tuta unuigita homaro batalos ne inter si, sed komune kontraŭ la fortoj de la naturo por perlabori siajn panon kaj feliĉon: „*Longe daŭros ankoraŭ malluma nokto sur la tero, sed ne eterne ĝi daŭros. Venos iam la tempo, kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuaj kontraŭ aliaj. Anstataŭ konstante batali inter si. . . ili vivos inter si pace kaj frate, en plena interkonsento ili laboros sur la tero, sur kiu ili vivas, kaj batalos kontraŭ tiuj krudaj fortoj de la naturo, kiuj ilin ĉiujn egale atakas.* Kaj kune kaj interkonsente ili celados al unu vero, al unu feliĉo“<sup>5</sup> (Londono, 1903; elstarigoj miaj: C. M.).

Tiu optimisma bildo pri la funkcia aspekto de la estonta homaro malkaŝas al ni minimume tri menciindajn aferojn: (1) ke la fabla enigmo pri „rompado de la muroj“ Zamenhof mem precize decifiris ne nur per solvo de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj kaj efika brido de la religia fanatecemo, sed ankaŭ per forigo de la ekonomia malegaleco kaj detruo de la interklasa antagonismo interne de ĉiu nacio. Tion oni atingos per neniiigo de la kapitalismo (t. e. „kiam la homoj ĉesos esti lupoj unuaj kontraŭ aliaj“) kaj per esenca rekonstruo de la socio laŭ la principoj de socialismo-komunismo; (2) ke Zamenhof pentris la bildon de la estonta socio sub la inspira influo de la komunismaj ideologoj Karlo Marks kaj Frederiko Engels; (3) ke Zamenhof estis kapabla kompreni jam antaŭ 80 jaroj tion, kion eĉ la nuntempaj filozofoj kaj politikistoj de la imperiismo — adeptoj de senbrida individuismo kaj disiga pluralismo — ne emas kaj ne ŝatas kompreni, nome: ke la mondo estiĝos pli bona, pli bela kaj pli riĉa, se ĉiuj homoj havos nur unu intereson, nur unu veron, nur unu feliĉon.

Efektive la venko de revolucio en la landoj de reala socialismo konfirmas ĉiam pli kaj pli evidente tiun tendencon en la disvolvo de la homaro, pri kiu Zamenhof ofte, libere kaj senbride revis, sed nur rare alude kaj eĉ enigme (li) povis paroli al la publiko.

### Notoj

1. Canko Murgin: Pensiga momento en la poezio de D-ro L. L. Zamenhof, p. 10—11, Bulgara Esperantisto, L11, 12, dec. 1983.

2. Joh. Dietterle (red.): L. L. Zamenhof — Originala Verkaro, Lejpcig, 1929, p. 370.

3. Same, p. 379, p. 380, p. 381.

4. L. L. Zamenhof: Pri la Homaranismo, p. 3, Litova Stelo, III-a periodo. V. 6 (30), nov.-dec. 1939.  
5. Noto 2, p. 383.

CANKO MURGIN

## La Fundamento

### PRI LA KARAKTERO KAJ ROLO DE LA „FUNDAMENTO“

La sola, unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniŭ havas la rajton fari ŝanĝon\*. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj, donitaj en la donita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj „tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto“.

Ĉiun ideon, kiune povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo, al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

\*Unua teksto: fari iam eĉ la plej malgrandan ŝanĝon.

El la „Bulona Deklaracio“, redaktita de Zamenhof kaj unuvoĉe akceptita de la Unua Kongreso, 1905, O. V. p. 238

### PRI LA NETUSEBLECO DE LA „FUNDAMENTO“

La netusebleco de la Fundamento ne en senco de fetiĉismo, kiel malvere diras niaj kontraŭuloj, sed en senco de malpermeso de *rompado*. . . estas la plej necesa rimedo, por ke . . . la novaj esperantistoj bonege komprenu la malnovajn esperantistojn kaj la malnovajn verkojn, t. e. por ke nia lingvo ĉiam konservu severan *unuecon*, kiu por lingvo estas multe pli necesa, ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera perfekteco.

Al la Lingva Komitato (20. XII. 1907)  
L. Z. II. p. 113.

Ĉiu, kiu volas nur kompreni, komprenas ja tre bone, ke la „Fundamento“, pri kiu parolas la Bulona Deklaracio, neniam havis la celon prezenti ian „sanktan libron“, sed ĝia celo estas nur: *gardi la kontinuecon de nia lingvo*.

Let. al Bourlet (18. VII. 1908) L. Z. II. p. 216.

### PRI LA RESPEKTO DE LA FUNDAMENTO

Kun la *Fundamento* ni devas esti tre singardaj; ĉar se ni ĝin rompos sen ia *tre grava bezono* kaj sen KOMUNA INTERKONSENTO, tiam la tuta lingvo ruinigis.

Let. al Bourlet (17. II. 1911)

(El „Lingvaj Respondoj“ de L. L. Zamenhof, 1962)

ATANAS KRUMOV

### ZAMENHOF

(Okaze de lia naskiĝtago)

Ekdronas sekundoj  
en tempoprofundojn.  
Kaj kiu ekpovus  
temp-erojn haltigi,  
kaj nombre limigi?  
Sekundoj en horoj,  
en jaroj grupiĝas,  
la jaroj en Tempo Pasinta ariĝas.  
Denove decembras.  
Denove ni festas.  
Denove jariĝo de Zamenhof estas.  
En tiu tre kara  
kaj festa kunveno,  
personon kaj vivon  
de l'Majstro ni benu!

Ni festu la homon  
kun granda animo,  
simila al Bruno\* —  
serĉinta novsunon,  
por ke belecon kaj bonon prilumi.

En nia kara lingvo Esperanto  
ni glori ĝian majestatan verkanton!  
La jaroj ĉenere de ni jam foriras,  
sed Zamenhof-faron ni ĉiam admiros.  
Al Majstro plej nia, plej homa, genia  
al Lia grandfaro — profundan klinigon!

\* Giordano Bruno (1548—1600) — itala filozofo kaj poeto, reprezentanto de la panteismo. Persekutata de la ekleziuloj pro siaj mondkonceptoj, akuzita pri herezo kaj liberpensado, post okjara malliberigo li estas stiparumita la 17-an de februaro 1600.

# Bulgaraj esperantistoj pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo

(Daŭrigo de n-ro 11/84)

146. **Ljuben Ŝkodrov** — nask. 24. XII. 1919 en u. Pazargik. Sekretario de DK de RMS. Politkomisaro de partizana trupo. Pereis en batalo sur pinto Eleĝik, Rodopimontaro (15. II. 1944).

147. **Stojan Dimitrov Mihajlov** — nask. 25. V. 1921 en u. Pazargik. Studento. Membro de RMS. Suferis koncentrejon. Partizano en taĉmento „Georgi Benkovski“. Mortpafita apud v. Pärvenec, distrikto de Plovdiv (4. VIII. 1944).

## Pernik

148. **Ivan Bankov Dobrey** — nask. 27. IX. 1919 en v. Berievo, distrikto de Gabrovo. Telegrafisto en Pernik. Membro de BKP. Pro komunista agado mortkondamnita kaj pendigita en la Centra Malliberejo en Sofio (2. XI. 1943).

149. **Aleksandăr Maĝarski** — nask. 30. III. 1910 en v. Vladimir. Laboristo. Sekretario de la loka organizado de BKP. Komandanto de partizana trupo. Pereis en batalo en Rodopimontaro (3. VI. 1944).

## Pleven

150. **Mladen Blaĵev** — nask. 14. VI. 1914 en v. Stejerov. Membro de RMS. Kiel soldato arestita pro komunista propagando, terure inkviziciata, sekve de tio grave malsaniĝis. Mortis la 3-an de junio 1938.

151. **Dončo Atanasov** — nask. 14. IV. 1911 en u. Pleven. Membro de DK de RMS. Kunlaboris per artikoloj en la gazetoj „RLF“ kaj „Kulturo“, al ĵurnalo „Zarja“. Multfoje arestata kaj terure inkviziciata, sekve de kio peze malsaniĝis. Mortis en sia naskiĝurbo (26. V. 1940).

152. **Ljuben Mojseev** — nask. 7. X. 1921 en v. Novaĉene. Membro de RMS. Pro revolucia agado sinsekve eksigita el la gimnazioj en urboj Pleven, Nikopol, Sviŝtov kaj ekzameniĝis kiel privata lernanto en u. Ljaskovec. Tre ofte arestata kaj turmentata, li grave malsaniĝis. Malgraŭ tio li gvidis la junularan revolucion agadon tiel en sia naskiĝvilaĝo, kiel en la regiono. Laŭ polica ordono kuracisto per injektilo ĉesigis lian vivon ĝuste en la tago de lia 20-jariĝo, la 7-an de oktobro 1941.

153. **Canko Stanĉev** — nask. 8. VII. 1923 en v. Goljama Ŝeljajna, distrikto de Loveĉ. Loĝis en Pleveno Forĝisto. Membro de DK de RMS. Pereis en batalo apud v. Dăbovan (11. II. 1942).

154. **Lenin Miŝev** — nask. 20. I. 1920 en v. Lenkovo. Loĝis en u. Pleven. Membro de DK de RMS. Pereis en interpafado kun la polico apud v. Gigen (12. II. 1942).

155. **Georgi Petrov Iliev** — nask. 15. II. 1920 en u. Pleven. En 1941 ekzilita sur insulo Tasos (Greklando). Post la liberigo daŭrigis la revolucion agadon en Pleven. Militista ĵugejo mortkondamnis lin. Pendigita en la malliberejo en Pleven (22. VI. 1942).

156. **Borislav Nankov** — nask. 9. XI. 1918 en v. Obnova. Studento. Membro de RMS. Kunlaboranto de la Militista Komisiono ĉe la Centra Komitato de RMS. Mortkondamnita foreste. Arestita kaj mortpafita en iu kazerno en Sofio (oktobro 1942).

157. **Liljana Bărdarova** — nask. 15. IX. 1922 en u.

Pleven. Lernantino. Sekretario de la komitato de RMS en la gimnazio. Eksigita el la gimnazio nur 4 tagojn antaŭ la lasta lernotago. En aŭgusto 1943 aliĝis al la partizanoj. En kruela batalo en decembro ŝi estis vundita, sed sukcesis eskapi. Post kelkaj tagoj ŝi estis perfidita kaj kruele mortigita (23. XII. 1943).

158. **Binka Paraŝkevova** — nask. 12. XI. 1925 en v. Gertalovo. Lernantino. Membro de RMS. Suferis polican areston en 1943. Post la liberigo aliĝis al la partizanoj. Kaptita, post kruela turmentado mortigita en la policejo en Pleven (31. XII. 1943).

159. **Ljuben Veŝkov** — nask. 14. V. 1914 en v. Peliŝat. Kudristo. Sekretario de RK de BKP. Politmalliberulo. En 1942 fariĝis partizano, komandanto de partizana trupo. Pereis en batalo en la arbaro apud v. Vălčitrân (9. IV. 1944).

160. **Penčo Apostolov** — nask. 21. II. 1915 en u. Pleven. Arestita kiel lernanto kaj pasigis du jarojn en malliberejo. Post la liberigo membro de DK de RMS. Post ekzameno kiel privata lernanto fariĝis studento pri juro. Denove suferis malliberigon, nun en koncentrejo. Baldaŭ post la liberigo estis denove arestita kaj mortpafita en la arbaro apud v. Vălčitrân (28. IV. 1944).

161. **Cvjatko Georgiev Markov** — nask. 21. V. 1913 en u. Pelovo. Sekretario de la loka organizado de RMS, membro de BKP. Suferis koncentrejon. Komandanto de partizana taĉmento „Dunav“. Pereis en la batalo por konkero de v. Begleĵ (19. VI. 1944).

## Plovdiv

162. **Vasil Atanasov Popov** — nask. en 1903 en n. Jenikjoj (Greklando). Loĝis en u. Asenovgrad. Tabaklaboristo. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝisman Ribelon en 1923 en v. Bracigovo, distrikto de Pazargik. Mortpafita kune kun granda grupo da ribelintoj sur la ŝoseo proksime de u. Bracigovo (29. IX. 1923).

163. **Ĉudomir Kantargiev** — nask. en 1883 en ua Sliven. Ludis gvidan rolon en la makedona naciliberega movado. Partoprenis la preparon de la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923. Mortigita en la policejo en Plovdiv (18. IX. 1924).

164. **Jordan Karapetkov** — nask. 20. II. 1905 en v. Jenikjoj (Greklando). Loĝis en Plovdiv. Tabaklaboristo. Sekretario de DK de BKMS. Partoprenis la preparon de la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923. Mortpafita sur la strato en Plovdiv (18. V. 1925).

165. **Teodosi Ĉolakov** — nask. en 1901 en u. Plovdiv. Tabaklaboristo. Membro de DK de BKMS. Partoprenis la preparon de la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923. Mortpafita sur la strato en Plovdiv (18. V. 1925).

166. **Vasil Atanasov Kulinski** — nask. en marto 1889 en v. Mraĉenik. Kudristo. Fondis la lokan organizaĵon de BKP en sia naskiĝvilaĝo. Vilagestro. Partoprenis la kontraŭfaŝisman ribelon je la 9-a de junio 1923, pro kio estis kruele persekutata. En 1925 fuĝis en la montaron. En interpafado kun la polico estis grave vundita kaj baldaŭ mortis (2. VI. 1925).

167. **Stojan Stojanov Mihajlov** — nask. 20. IX. 1907 en v. Dokli (Greklando). Loĝis en u. Plovdiv. Tabaklaboristo. Sekretario de RK de BKR. Pro polica torturado malsaniĝis kaj mortis en 1936.

168. **D-ro Simeon Grozev Dimitrov** — nask. 4. IX. 1909 en v. Dragojnov. Membro de RMS. Studis medicinon en Francio. Dum la intercivitana milito en Hispanio estris respublikanan militistan hospitalon.

Pereis sekve de malamika aviadila bombado de la hospitalo (20. VIII. 1937).

169. **Vasil Apostolov Rajčev** — nask. 29. I. 1909 en v. Boljarci. Membro de RMS. Pro politika persekuto elmigris en Sovet-Uniön. Partoprenis la Internaciajn Brigadojn en Hispanio. Pereis kiel aviadisto dum bataloj apud Madrido en 1937.

170. **Kosta Vasilev Filipov** — nask. 26. III. 1908 en u. Zlatograd. Loĝis en u. Plovdiv. Membro de BKP. Pro persekutado en 1935 elmigris en Greklandon. Mortis en la malliberejo en Ateno en 1938.

171. **Nikola Iv. Bonev** — nask. 20. V. 1911 en v. Babek. Oficisto. Kunlaboranto de DK de BKP. Mortigita la 28-an de oktobro 1941.

172. **Ilin Dojčev Ilinov** — nask. 23. III. 1912 en v. Mätenica. Laboristo. Membro de RK de RMS. Estris batalgrupon. Mortkondamnita kaj pendigita (17. VIII 1942).

173. **Ivan Ĥristov (Zăbčeto)** — nask. 16. IV. 1919 en u. Gjumjurgina (Greklando). Loĝis en Plovdiv. Membro de RMS. En 1936—1939 politika malliberulo. Sekretario de RK de RMS en Sofio (1941—1942). Mortkondamnita kaj pendigita en la Centra Malliberejo en Sofio (8. II. 1943).

174. **Todor Boev Kadirev** — nask. 31. XII. 1907 en v. Cehlare. Membro de BKP. Partizano en brigado „Ĥristo Botev“. Pereis en batalo apud v. Zlatosel (7. IV. 1943).

175. **Menaĥem A. Menaĥemov** — nask. 7. XI. 1923 en Ĥaskovo. Loĝis en Plovdiv. Membro de RK de RMS. Partizano en taĉmento „Anton Ivanov“. Perfidita, post kruelaj torturoj mortpafita apud v. Radievo, distrikto de Pazargik (9. VI. 1943).

176. **Blago Jankov Kargaliev** — nask. 7. IV. 1921 en u. Ĥaskovo. Loĝis en Plovdiv. Tabaklaboristo. Senpartia. Mortigita en la policejo en u. Plovdiv (20. VI. 1943).

177. **Nikola Slavov Getov** — nask. 28. VI. 1915 en v. Râjevo Konare. Partizano. Pereis la 28-an de junio 1943.

178. **Albert Benvenisti** — nask. en 1914 en u. Plovdiv. Membro de BKP. Partizano en taĉmento „Anton Ivanov“. Pereis en batalo (30. VI. 1943).

179. **Enju Tošev** — nask. 18. II. 1913 en u. Peruŝtica. Sekretario de la loka organizaĵo de RMS. Politika malliberulo. Eskapis el la malliberejo kaj fariĝis partizano en taĉmento „Anton Ivanov“. Pereis en batalo apud v. Brestovica (5. XI. 1943).

180. **Kostadin Rajev Stojev** — nask. 12. I. 1920. Senpartia. Kiel soldato aliĝis al la soldata partizana taĉmento „Ĥristo Botev“. Pereis en batalo en Jugoslavio (21. II. 1944).

181. **Matej Semkov Koĝamanev** — nask. 4. VIII. 1922 en v. Karavelovo. Senpartia. Kiel soldato aliĝis

al soldata partizana taĉmento „Ĥristo Botev“. Pereis en batalo apud u. Stip (Jugoslavio) (22. II. 1944).

182. **Zelma Dekalo** — nask. 27. XI. 1924. Kudrislino. Membro de RMS. Aliĝis al partizana taĉmento „Anton Ivanov“. Pereis en batalo (28. II. 1944).

183. **Dobri Bojilov Jekov** — nask. 14. I. 1926 en u. Plovdiv. Laboristo Membro de RMS. Partizano en taĉmento „Anton Ivanov“. Pereis en batalo (28. II. 1944).

184. **Albert Mois Alkolumbre** — nask. 10. VIII. 1922 en u. Pleven. Metalisto. Membro de RMS. Partizano en taĉmento „Anton Ivanov“. Pereis en batalo (1. III. 1944).

185. **Kiril Barutčiev** — nask. 23. II. 1924 en u. Asenovgrad. Larnanto. Membro de RMS. Partizano en taĉmento „Anton Ivanov“. Pereis en Rodopi-montaro proksime al u. Batak (2. III. 1944).

186. **Apostol G. Zlačev** — nask. 30. VI. 1920 en u. Peruŝtica. Membro de RMS. Partizano en brigado „Georgi Dimitrov“. Pereis en batalo sur Rodopimontaro (24. V. 1944).

187. **Vaska Garčeva** — nask. 22. XII. 1918 en u. Ksanti (Greklando). Loĝis en u. Plovdiv. Sekretario de RK de RMS. Estris batalgrupon. Aliĝis al partizana brigado „Georgi Dimitrov“. Pereis en batalo sur Rodopimontaro (4. VI. 1944).

188. **Stefan Dimitrov Stavrev** — nask. 28. II. 1924 en u. Peruŝtica. Membro de RMS. Ĥelpanto de la partizanoj. Mortpafita apud rivero Văca (6. VI. 1944).

189. **Stefan Nikolov Georgiev** — nask. 5. IV. 1910 en v. Pavelsko, distrikto de Smoljan. Loĝis en u. Plovdiv. Kuprajmetiisto. Membro de BKP. Suferis malliberejon kaj koncentrejon. Komandanto de partizana trupo „Georgi Ječev“. Pereis en batalo sur Rodopimontaro (23. VII. 1944).

#### Razgrad

190. **Krăstju Borisov Belenski** — nask. 4. V. 1920 en v. Ostrovce. Membro de RMS. Pro revolucia agado en la kazernoj de u. Plovdiv mortkondamnita kaj ekzekutita en tiu urbo (25. VII. 1942).

#### Ruse

191. **Djanko Stefanov** — nask. 15. XII. 1915 en v. Pomeŝtica, distrikto de Tărgoviŝte. Politmalliberulo dum 1935—1938. Sekretario de DK de BKP en Ruse. Mortkondamnita foreste, kaptita kaj mortigita apud v. Dolapite (7. X. 1943).

### ESPERANTO — DEVIGA STUDOBJEKTO EN SOFIA MEZLERNEJO

8-a „d“ klaso en VIII Sofia mezlernejo „Vasil Levski“ estas la unua klaso en Bulgario, kiu lernas Esperanton kiel devigan studobjekton. En tiu lernejo oni povas lerni laŭdezire la hispanan, italan, francan, anglan aŭ germanan lingvojn, kaj nun — ankaŭ Esperanton. Ĝin elektis 40 ĝelernantoj. La solenan kunvenon en la lernejo ĉe malfermo de la lernoĵaro ĉeestis Neli Holeviĉ — iniciatintino de la eksperimento, prof. Guĝev — vicprezidanto de la Esperanto-Akademio, d-ro Stamenova — prezidantino de la Urba Estraro de BEA en Sofio, Marin Bačev — ĉefmetodikisto de BEA kaj aliaj gastoj.

Varme salutis la ĝelernantojn kaj bondezi-

ris al ili sukceson en la lernado de Esperanto prof. Guĝev, Marin Bačev kaj la direktorino de la lernejo — Sijka Peltekova.

La bulgara esperantistaro atendas esperplene la rezulton de tiu eksperimento.

Ni ĉiuj bondeziru sukceson al la estontaj esperantistoj!

**Noto de la redakcio:** En n-ro 8/84 de „Bulgara Esperantisto“, sur p. 13, sub titolo „Nova grava paŝo“ ni donis lokon al artikolo de prof. S. Guĝev, kiu traktis permeson de la Ministerio de Popola Klerigado pri regula (deviga) instruado de Esperanto, sub formo de eksperimento, en VIII Sofia Mezlernejo „V. Levski“. Nun ni informas pri inaŭguro de la E-lernoĵaro en tiu lernejo. La redakcio observos la eksperimenton kaj regule informos pri ĝi.

# JAPANIO — MALPROKSIMA KAJ PROKSIMA

(Daŭrigo de n-ro 10)

Ĉe la enirejo de la sanktejo estas grandaj platoj kun pendantaj sur ili lignaj tabuletoj, sur kiuj estas skribitaj diversaj deziroj — pri sano, bona edzo, infano, sukcesa ekzameno, pri sopirata ofico ktp. Multaj el la japanoj kredas, ke se oni metas tian tabuleton kun deziro en la templon aŭ sanktejon, ĝi nepre realiĝos. Ni povus viziti ankoraŭ multajn templojn, sed mankis tempo. Nia programo estas strikte difinita. Ni tagmanĝas survoje sandviĉojn. Ili estas tre bongustaj. Inter la panpecoj estas abunda farĉaĵo el majonezo, ŝinko, mustardo, kukumioj kaj tomatoj.

Denove ni uzas kombinitan transporton — aŭtobuson, vagonaron, metroon. Fine ni denove estas en Jokohamo. Kaj ni direktiĝas al la E-klubo, kie esperantistoj el la urbo jam atendas nin. Speciale por la renkontiĝo estis veninta f-ino Toŝiko Okinaga, juna ĵurnalistino el la Kultura Fakto de Presagentejo „Gigi-Suusinsŝa“. Post la kutima regalo — verda teo kaj sukeraĵoj, kiu estas tradicia momento en la japana maniero akcepti gastojn, mi rakontis pri la soci-politika stato de la virinoj en nia lando, pri la bulgara E-movado, pri la Internacia Esperanto-Kursejo kaj mi denove projekciis lumbildojn. F-ino Okinaga longe intervjuis min. Ŝi montris specialan intereson pri la virinaj problemoj, ĉar la nuntempaj japanaj virinoj batalas por plena egalrajteco. Ilia batalo estas malfacila, ĉar ili konfrontiĝas kun tradiciaj superstiĉoj kaj antaŭjuĝoj el la pasinteco.

Kaj denove mi estas survoje — al Tokio. Jokohamo kaj Tokio preskaŭ kunfandiĝis. Pro tio mi tute ne komprenas kiam ni eniras la japanan ĉefurbon. Akompanate de s-ro Kurita, mi faras kelkhoran ekskurson tra la urbo per speciala aŭtobuso de la firmao „Kato bus“ (aŭtobuso de la kolombo). Tiuj aŭtobusaj rondvojaĝoj estas preferataj de eksterlandanoj kaj japanoj, ĉar tre spertaj ekskursgvidantoj montaras la vidindaĵojn de Tokio. Tokio estas pompa urbo kun supermodernaj konstruaĵoj kaj trafiko. La ĉielskrapantoj dominas super la ceteraj domoj. Tie ĉiu konstruaĵo distingiĝas de la ceteraj laŭ formo kaj stilo. Multaj el ili estas veraj majstroverkoj de la arkitektura arto. Cetere, tio koncernas ankaŭ la pli malaltajn, ordinarajn domojn, kiuj plimultas en Tokio. Ilin oni konstruas el lignomaterialo, ili estas kun glazuritaj tegmentoj kaj kun la ĉiamaj etaj ĝardenoj, en kiuj kreskas cedraj kaj acidĉerizaj arboj kaj floroj, tre ofte plan-

tilaj en florpotoj. La japanoj per sia fama laborememo, per sia sento pri beleco faras aspekti ravaj la plej ordinarajn aĵojn, aldonas al ili neripeteblan ĉarmon. Pro tio egale multe al mi plaĉis la ĉielskrapantoj kaj la ordinaraj domoj, la belaj luksaj stratoj kunelegantaj vitrinoj kaj brilaj lumoj kaj la malgrandaj hejme- kaj stratetoj kun sennombraj butikoj. . . Mi estis mirigita pro la pureco, kiu regas en la multmiliono urbo. Tamen, bedaŭrinde, Tokio estas unu el la mondurbegoj kun plej malpurigita aero. Kvankam oni multe laboras pri tiu problemo, ĝi ĉiam ankoraŭ estas nur parte solvita.

Sed en la aŭtobuso la klimatinstalaĵo funkcias senripoĉe kaj tio faras la promenadon tra la japana ĉefurbo tre agrabla. Ni haltas antaŭ la imperiestra rezidejo, situanta en la centro de Tokio. Ĝi estas ĉirkaŭita per muro, kanalo kaj arboj. Antaŭ la parada enirejo etendiĝas belega ĝardeno el malaltaj pinoj. Sternajo el etaj ŝtonoj sur la aleoj kaj la placo aldonas romantikan aspekton al tiu loko. Poste ni direktiĝas al unu el la plej altaj televidturoj. Per superrapida lifto ni atingas la etaĝon por turistoj, de kie malkovriĝas belega panoramo al la japana ĉefurbo. Kontraŭ pago oni povas rigardi tra teleskopoj. Kaj al ŝatantoj de pli fortaj travivaĵoj oni proponas malsupreniri ne per la lifto, sed piede, laŭ spirala ŝtuparo. S-ro Kurita kuraĝe direktiĝas al ĝi, sed mi kategorie rifuzas. La lifto transportas nin al la kvara, tria kaj dua etaĝoj, kie troviĝas kelaj elegantaj butikoj, kafejoj, ludejoj, infanaj haloj kun amuzludoj k.t.p.

La promonado en la televidturo iras al sia fino. Tuj poste, per la aŭto de s-ro Kurita



Vasja Cvetkova kaj s-ro Kurita en la Japana E-Instituto

ni direktiĝas al la Japano Esperanto-Instituto. Ni haltas antaŭ kelketaĝa konstruaĵo, super kies enirejo estas ŝildo kun surskribo — Japano Esperanto-Instituto. Mi emociite transpasas la sojlon. S-ro Kurita prezentas min al la sekretario de la Instituto s-ro Moritaka Osio-ka, kiu invitas nin sidigi kaj proponas al ni teon kaj malvarmajn senalkoholajn. Mi ĉirkaŭrigardas. Kelkaj labortabloj, tajpmasinoj, telefonaparatoj, paperujoj, kaj sur unu el la muroj—bretoj ĝis la plafono kun multaj Esperantaj libroj el la tuta mondo. Mi rimarkas ankaŭ kelkajn librojn el Bulgario. S-ro Osio-ka evidentiĝis agrable kunparolanto, bonega esperantisto kaj komplezema homo. Ni direktiĝas al la kvara etaĝo, kie Japano Esperanto-Instituto disponas pri du dormoĉambroj, kuirejo, tenejo, banejo. Ambaŭ etaĝoj estas propraĵo de la Instituto. Oni montras al mi la ĉambron, kie mi dormos. La planko estas kovrita per mola tapiŝo, la klimatinstalaĵo funkcias.

Post nelonga ripozo mi malsupreniras al la tria etaĝo. En la salono apud la kancelario jam estas kolektiĝintaj multaj Tokiaj esperantistoj. La prezidanto de la Japano Pacdefenda

Esperantista Asocio prezentas min al la ĉeestantoj kaj malfermas la kunvenon. Mi parolas pri la bulgara Esperanta porpaca movado, pri la Esperanto-kursejo en Smoljan-distrikto, pri Bulgario. Al mi estas tre agrable, ke la japanoj manifestas intereson pri multaj aferoj ĉe ni, mi sentas min en amika atmosfero, kompreneble — dank' al la mirakla influo de Esperanto. Tion aparte mi sentas nun, troviĝante je miloj da kilometroj for de mia patrolando.

Post la kunveno s-ro Osio-ka invitas la ĉeestantojn al vespermanĝo en japanstila restoracio. Ĉirkaŭ deko da personoj akceptas la inviton. Dum la vespermanĝo mi konatiĝas kun alia tre interesa persono — s-ro Suiĉi Jama-kava, laŭ profesio — tradukisto el angla lingvo. La sekvantan tagon li prezentis al mi siajn konceptojn pri la japanaj esperantistoj en tre originala kaj konvinka formo. Tio instigis mian scivolemon kaj mi aŭskultis lin kun atento kaj intereso. Sajnis al mi, ke li bone observas kaj sentas la evoluon de la Esperanto-movado en Japanio kaj faras tre valorajn konkludojn.

(Daŭrigota)

VASJA CVETKOVA

## Ĉu en la sistemo de UEA ekzistas internacia Esperanto-asocio de juristoj?

Tiu ĉi demando naskiĝis depost la UEA-kongreso en Hamburgo (1974). Ĝis tiam tia demando ne leviĝis, ĉar estis klare, ke en la sistemo de UEA ekzistis Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (IEAJ). Prezidanto de IEAJ estis Ivo Lapenna, kiu samtempe estis prezidanto de UEA. En la Hamburga kongreso Ivo Lapenna ne estis reelektita kiel prezidanto. Li forlasis tiam ne nur la postenon de prezidanto de UEA, sed ankaŭ UEA mem. La eliro el UEA tamen starigis la demandon: ĉu homo, kiu estas **ekster** UEA, povas esti prezidanto de organizacio, kiu estas **en** UEA. La respondo ne estas malfacila. Ivo Lapenna devis demisi. Li tamen trovis alian „solvon“. Li „eligis“ IEAJ el UEA.

Ĉi tio ne estas stranga. Stranga estas alio.

Strange estas, ke multaj membroj de IEAJ kaj eĉ membroj de la estraro de UEA opinias, ke la „eligo“ estas valida, ke nun IEAJ estas ekster UEA kaj ke en la sistemo de UEA asocio kun la nomo Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj ne ekzistas. Kvazaŭ IEAJ estis propraĵaĵo de Ivo Lapenna kaj tute nature li povis ĉe sia eliro kunporti kun si sian propraĵaĵon.

IEAJ neniam eliris el UEA. Eliris ĝia prezidanto. IEAJ „restis“ en UEA kun sia membraro, kun sia statuto. Sekvas, ke oni devas elekti prezidanton, estraron. Mankas tamen iniciato. Mankas la morala kaj materiala helpo fare de UEA.

LJUBOMIR MIHAJLOV

### GASTE EN ĜEMELURBOJ

Ĉi-aŭtune, de la 26-a de septembro ĝis la 9-a de oktobro esperantistoj el Sumen gastis en GDR. Grupo el la societo „Metalurgo“ vizitis la samideanojn en Pirna kaj poste ĉeestis en Dresden kunsidojn de la IV-a Centra Renkontiĝo de Esperantistoj el GDR.

La delegitaro unue vizitis Usti nad Labem, kore akceptita de la tuta urba esperantistaro. En la loka kulturdomo okazis granda E-kunveno kaj la prezidanto de E-societo „Vekiĝo“ Cvjatko Todorov prelegis pri temo „Bulga-

rio — lando de rozoj“. Poste, dum amika interparolo estis traktataj la taskoj, kiujn la bulgaraj (el Sumen) kaj ĉeĥoslovakaj (el Usti nad Labem) esperantistoj devas plenumi laŭ la kontrakto inter ĝemelsocietoj.

Sekvis vizito al Magdeburgo aj esperantistoj. Dum la vizito en GDR la grupo renkontiĝis ankaŭ kun esperantistoj el Berlino.

La Sumenaj esperantistoj invitis siajn samideanojn el Usti nad Labem, Magdeburgo kaj Berlino viziti nian landon.

ĤRISTO TONEV

### Seminario por junaj E-vidantoj

Laŭ iniciato de la junulara sekcio de BEA inter la 12-a kaj 18-a de oktobro k. j. en Pisana estis organizita Seminario por Junaj E-Gvidantoj. Ĝin oni dediĉis al la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario. Partoprenis aktivuloj de la junularaj E-sekcioj el Ĉeĥoslovakio, GDR kaj Hungario, junaj reprezentantoj de distriktaj estraroj de BEA.

La programo de la Seminario estis vasta kaj riĉa. Belka Beleva faris tre interesan kaj altnivelan prelegon — „Esperanta kulturo dum la kvardek jaroj de socialisma Bulgario“. Atentokapte prelegis Bistra Dojĉinova pri temo: „La agado de BEA dum la kvardekjara socialisma prospero en Bulgario“. Doc. Georgi Dimov demonstris la Ĉe-metodon kaj Mariana Elenova dividis siajn sperton kaj ideojn pri E-instruado al gejunuloj. Gabor Markus (Hungario) konigis al ni la E-movadon en Japanio kaj Ĉinio.

Du tagojn la distriktaj reprezentantoj pri-traktis siajn problemojn kun la estraro de Bulgara Esperanto-Junularo (BEJ), dezirante trovi ĝustan vojon al esperantistigo de junuloj. Steliana Dimitrova, prezidantino de BEJ, raportis pri la laboro de la nuna estraro de la junulara sekcio de BEA. Denove oni pripensis la konkretajn taskojn, kiuj staras antaŭ la junularaj E-gvidantoj. Laŭ propono de la estraro de BEJ estis elektitaj sep temoj, pri kiuj la ĉeestantaj gejunuloj deziris interŝanĝi siajn opiniojn kaj sperton.

Ne mankis distraj programeroj: ekskursoj al urbo Smoljan (trarigardo de la novekonstruita urbocentro), tuttaga ekskurso al la internacie konata feriejo Pamporovo en Rodopi-montaro, al montopinto „Esperanto“, projekciado de diapozitivaj, renkontiĝo kun esperantistoj el Smoljan, amuzoj en disko-klubo.

Post semajno en amika kaj labora atmosfero ni disigis esperante, ke la Seminario por Junaj E-Gvidantoj helpas la sukcesan realigon de estontaj iniciatoj.

ST. DIMITROVA

#### KVARA NACIA FERVOJISTA E-KONFERENCO

La 6-an kaj 7-an de oktobro j.k. Gorna Orjaĥovica kore bonvenigis la delegitojn de la IV-a fervojista E-konferenco. La lokaj esperantistoj el societo „Impeto“ ĉe-kape kun sia prezidanto

Boris Stojanov prizorgis la bonan organizon de la konferenco.

Ĝi okazis en la Kulturdomo de Transport-laboristoj. Ĉeestis 96 delegitoj el la tuta lando, inter ili Krâstju Karucin — membro de CE de BEA kaj Draguŝko Petrov — kunlaboranto de CE de BEA.

La prezidanto de la Fervojista Sekcio ĉe BEA Marin Marinov faris la jarraporton. Li parolis pri la IFEF-kongreso, organizita printempe en Slânĉev Brjag, informis, ke en nia IFEF-sekcio jam membras tri novaj E-societoj — el Velingrad, Blagoevgrad kaj Jambol.

Antaŭ la ĉeestantoj parolis ankaŭ Krastju Karucin kaj Georgi Dolapĉiev (redaktoro de „Bulgara Fervojisto“). Financajn raportojn faris Viktor Cenov — pri la IFEF-kongreso kaj Adriana Georgieva — pri la sekcio.

Dum la konferenco oni pridiskutis la novajn taskojn, starantajn antaŭ la sekcio, la partoprenon de bulgaraj esperantistoj-fervojistoj en la antaŭstaranta kongreso de IFEF en Vejle, Danio en 1985.

Prenis la parolon kaj interŝanĝis sperton multaj prezidantoj de fervojistaj E-societoj el la tuta lando. La ĉeestantoj havis la eblecon trarigardi la malgrandan filatelan ekspozicion de Georgi Litov el Sofio.

La dommastroj el Gorna Orjaĥovica estis preparintaj riĉan programon prezentitan ĉe la malfermo de la konferenco, interesan interkonan vesperon kaj havis la zorgon konigi al siaj gastoj la vidindaĵojn de la urbo.

La intereso pri lernado de la Internacia Lingvo ĉe fervojistoj kreskas. Omaĝe al la konferenco en la Sofia fervojvagono „Vasil Markov“ estis solene malfermita kurso de Esperanto por komencantoj.

VERKA ŜTAJNER

#### DISTRIKTA RENKONTIĜO DE E-INSTRUISTOJ

Dum pluraj jaroj ekzistas bonaj kaj utilaj kontaktoj inter la Distrikta Estraro de BEA en Ĥaskovo kaj la Distrikta Konsilantaro por Popola Klerigado, kiuj grave kontribuas por pli vasta enkonduko de E-instruado en la lernejojn de la distrikto.

Lige kun la malfermo de la nova lernejo la 16-an de oktobro ĉi-jare estis organizita Distrikta Renkontiĝo kun la direktoroj de lernejoj en la distrikto, kie Esperanto estas instruata fakultative. Organizantoj estis la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigado kaj la Distrikta Estraro da BEA en Ĥaskovo. La bele ornamita salono de la vasta E-Klubo en Ĥaskovo kolektis direktorojn kaj vicdirektorojn de 11 lernejoj el Ĥaskovo, Dimitrov-

grad, Simeonovgrad, Svilengrad, Ljubimec kaj vilaĝo Mineralni Bani, kaj instruistojn de Esperanto el tiuj lernejoj.

La Renkontiĝon partoprenis la vicprezidanto de la Distrikta Soveto pri Popola Klerigado Dojĉo Krâstev, la inspektisto Vasil Ivanov kaj la ĉefmetodikistino L. Grudeva. Ĉeestis ankaŭ membroj de la Buroo de la Distrikta E-estraro kaj prezidantoj de la E-societoj.

Gastoj de la Renkontiĝo estis la vicprezidanto de CE de BEA kaj komitatano de UEA inĝ. Petar Todorov kaj la sekretario de la Instruista Sekcio kaj ĉefmetodikisto ĉe CE de BEA Marin Bâcev.

La Renkontiĝon malfermis Nikola Pilev, prezidanto de la Distrikta E-estraro. Li substrekis la gravecon kaj la utilecon de tiaspekaj kunvenoj. La reprezentantoj de la Distrikta Konsilantaro pri Popola Klerigado emfazis la bonajn rezultojn de la intimaj kontaktoj, kiuj ekzistas jam kelkajn jarojn inter la Distrikta Konsilantaro por Popola Klerigado kaj la Distrikta E-Estraro en Ĥaskovo.

Estis starigitaj multaj demandoj, okazis vigla interŝanĝo de spertoj, opinioj, proponoj fare de la partoprenantoj. La instruistoj parolis pri la sukcesoj kaj mankoj en sia instrulaboro, la direktoroj kaj la vicedirektoroj esprimis sian kontentecon pri la okazigo de la Renkontiĝo kaj promesis subteni la vastan enkondukon de Esperanto-instruado en iliajn lernejojn. Ĉiuj konvinkiĝis pri la utilo de similaj kontaktoj kaj proponis, ke ili fariĝu konstanta parto en la tuta varba kampanjo kaj instruagado de la Distrikta E-Organizaĵoj.

Inĝ. NIKOLA UZUNOV

## NOVAJO EL RUSE

En vilaĝo Polsko Kosovo jam estas fondita nova societo, nomita „Fratego“, kiun prezidas la E-veterano kaj instruisto Jordan Atanasov.

Lige kun la 40-jara datreveno de la perejo de la esperantisto-partizanhelpano Andreo Jordanov Nenov la membroj de la societo vizitis la najbaran vilaĝon Pejĉinovo, kie nun staras la monumento de la esperantisto-heroo. Pri la vivo kaj agado de Andreo Nenov parolis Jordan Atanasov, kiu estis lia kursano en 1937. Pri lia revolucia agado parolis lia nevo Jordan Nenov Jordanov, tiam junulo 20-jaraĝa.

BORIS KAVALĜIEV

## ENHAVO

|                                                                              |         |
|------------------------------------------------------------------------------|---------|
| Ŝ. BOĈEV. Novjaraj bondeziroj . . . . .                                      | 11      |
| * * * Nin atendas novaj taskoj . . . . .                                     | 1       |
| * * * Ĉu numero de la leganto? . . . . .                                     | 2       |
| A. SOTIROVA. Kun la inspirita parolo de Vapcarov . . . . .                   | 3, 4, 5 |
| Ĥr. ISKROV. Batalanta heroldo . . . . .                                      | 6       |
| * * * Kun Esperantaj parolo kaj kanto tra Sovetio . . . . .                  | 7, 8, 9 |
| VI. JELEV. Gaste al E-klubo „Elbrus“ . . . . .                               | 9       |
| C. MURGIN. Rompu la murojn inter la nacioj . . . . .                         | 10, 11  |
| * * * La Fundamento . . . . .                                                | 11      |
| At. KRUMOV. Zamenhof . . . . .                                               | 11      |
| * * * Bulgara esperantistoj, pereintaj en la kontraŭfasisma batalo . . . . . | 12, 13  |
| V. CVETKOVA. Japanio — malproksima kaj proksima . . . . .                    | 14, 15  |
| Ĥr. TONEV. Gaste en la ĝemelurboj . . . . .                                  | 15      |
| St. DIMITROVA. Seminario por junaj E-gvidantoj . . . . .                     | 14      |
| * * * Enlanda movado . . . . .                                               | 16      |
| D. ĤITROV. „Leciono de Esperanto“ . . . . .                                  | IV      |

## VARIA, INTERESA, ABONEBLA

Ĉu vi deziras konatiĝi kun la E-pacmovado? Abonu ĝian organon „PACO“! Ĝi havas du variantojn: centra, aperanta en Sofio ĉiun duan monaton, krome — apartaj landoj eldonas po unu kajero jare — do entute aperas ĉirkaŭ 12 kajeroj jare.

En „PACO“ vi trovos:

- aktualajn informojn pri la pacbatalo;
- belajn rakontojn;
- interesajn lingvotemojn de elstaraj esperantologoj el tutmondo;
- poeziaĵojn;
- distrajn paĝojn.

„PACO“ regule aperigas skizojn pri eminentaj personoj el diversaj landoj.

La paca vivo estas varia, multkolora, mirinda — revuo „PACO“ respegulas ĝin.

Vi povas ankoraŭ aboni per la centra kancario de BEA.

Ni ĝojos gratuli vin kiel nian konstantan abonanton!

La redakcio de revuo „PACO“

Sur la kovrilpaĝo:

Vintre en Borovec. La skikurejoj allogas ŝatantojn de la vintraj sportoj.

Foto: Emilia Kirilova

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI, Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar HAĜIEV, Krâstju KARUCIN.

Administranto — Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97


1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio



## „LECIONO DE ESPERANTO“

(Dokumenta filmo pri la bulgara E-movado)

Laŭ iniciato de la Studio por Televidaj Filmoj „Ekran“ en Sofio, filma skipo en konsisto: scenaristo — Olga Văleva, reĝisoro — Dimităr Cekov kaj ĉefkameraisto — Gavril Draganov kreis 25-minutan koloran dokumentan filmon „Leciono de Esperanto“. Tio estas la unua bulgara profesia filmo, kies ĉefa temo estas la disvastigo kaj atingoj de la Internacia Lingvo en Bulgario ekde la unuaj jaroj de la jarcento ĝis hodiaŭ.

La laboron de la filma skipo helpis spertaj kaj elstaraj bulgaraj esperantistoj, kiuj disponigis al la filmistoj abundan dokumentan materialon kaj valorajn konsilojn kaj informojn. Ĉefaj konsultantoj estis Hristo Gorov, prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio, heroo de socialisma laboro, Nikola Aleksiev, honora prezidanto de MEM, heroo de socialisma laboro, kaj Donĉo Ĥitrov, prezidanto de la Filma Sekcio ĉe BEA. Multe helpis ankaŭ la kunlaborantoj de la Bulgara Esperanto-Muzeo, precipe Krăstju Karucin, respondeculo pri la arkivo de BEA, kaj ankaŭ multaj bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj.

La filmo „Leciono de Esperanto“ konigas al la neesperantista publiko interesajn, malmulte konatajn faktojn kaj personojn el la historio de la bulgara E-movado — la unuajn pionirojn Hristo Popov, Miloslav Bogdanov, iliajn lernolibrojn kaj ĉefverkojn pri kaj en Esperanto. Sur la ekrano aperas la kovriloj de multaj bulgaraj E-eldonaĵoj: libroj, gazetoj, vortaroj, broŝuroj — pruvo pri

vigla eldonagado. Tute senpere kaj facile la filmo kaptas la atenton, disponigante al la spektantoj riĉan informon pri la utila praktika aplikado de Esperanto en la ĉiutaga vivo kaj en la internaciaj rilatoj — festivaloj, recitaloj-konkursoj, kongresoj, leciono de Esperanto gvidata de Kunĉo Vălev en la Sofia Universitato. Sur la ekrano aperas konataj bulgaraj kaj alilandaj esperantistoj, kiuj parolas pri Esperanto kaj pri sia propra aktivado: la veteranoj Nikola Aleksiev, la Esperantaj poetoj Asen Grigorov kaj Penka Bateva, la aktoroj Nikolaj Binev, prof. Humphrey Tonkin el Usono, d-ro Renato Corsetti el Italio k. a. Aperas ankaŭ la portretoj de bulgaraj esperantistoj-kontraŭfaŝistoj, pereintaj en la batalo por libero kaj socialismo: Nikola Botuŝev, Diĉo Petrov, d-ro Vărban Genĉev, Vela Peeva, Cvetan Spasov. . .

Por montri kaj pruvi la internaciecon de Esperanto la aŭtoroj filmis momentojn el la 69-a UK de Esperanto en Budapeŝto 1982 — unu el la plej amase vizititaj dum la tuta cent-jara historio de la monda E-movado.

La televida elsendo de la filmo je la 23-a de oktobro j. k. feliĉe koincidis kun la okazigo de la Dua Kongreso de Esperantistoj el la Balkanlandoj en Ateno, Grekio.

Post la elsendo de la filmo multaj leteroj venis en la Bulgaran Televidon kaj en la Centran Oficejon de BEA.

Al la kreantoj de la filmo „Leciono de Esperanto“ — niajn korajn gratulojn kaj dankojn!

DONĈO ĤITROV

## UTILA KAJ FRUKTODONA SEMAJNO

La Sveda Esperanto-Federacio (SEF) — de la okcidenta regiono, kaj la Internacia Esperanto-Kursejo (Bulgario) organizis Studsemajnojn en Svedio — en la Norda Popola Altlernejo en urbo Kunglev — proksime de Göteborg. La programo inkluzivis kurson por komencantoj kaj progresintoj, kantkoncertojn de la mondfama kantisto-esperantisto Veselin Damjanov, filmprezenton, bazon de produktaĵoj de Bulgara Esperanto-Kooperativo, ekspozicion pri Bulgara Esperantista Asocio kaj la Internacia Esperanto-Kursejo.

La solenan malfermon ĉeestis: la rektoro de la Norda Popola Altlernejo, vicprezidanto de Sveda Esperanto-Federacio — Mårta Andreasson, sekretario de SEF — Anita Lindblom, ĉefdirektoro de la Internacia Esperanto-Kursejo — ing. A. Todorov, vicprezidanto de Bul-

gara Esperanto-Kooperativo (BEK) — ing. V. Oĵakov kaj pli ol 30 personoj, membroj de Esperanto-kluboj en Göteborg kaj Kunglev.

Dum la semajno estis prezentitaj interesaj prelegoj de ing. A. Todorov pri Bulgara E-movado, pri IEK kaj BEK kaj de Ebbe Wilborg pri la historio de la E-movado.

La partoprenantoj vizitis la aŭtomobilfabrikon „Volvo“ kaj konatiĝis kun la produktado de diversipaj aŭtomobiloj.

Ambaŭ flankoj interkonsentis pri daŭrigo de la rilatoj inter SEF kaj IEK — oni antaŭvidas dum la venonta 1985 interŝanĝon de mezlernejoj kaj denove organizadon de similaj Semajnoj en IEK — Bulgario, kaj Kunglev — Svedio.

Ing. A. TODOROV